




Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place Gaston Pailhau
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

SUB LA SUNO DE TOURS

Gérard kaj Jeannine tradukis artikolon pri Augustin Mouchot.	paĝoj 1 kaj 2	Augustin Mouchot (1825-1912), profesoro pri matematiko en la Descartes Liceo, inventis la unuan sunan motoron de la Historio. Prilumado pri tiu genia viziulo maljuste forgesita. Videbla ĉe la 4a, strato Bernard Palissy, la dediĉo estas modesta : « A. Mouchot konstruis en tiu domo de 1864 ĝis 1866, la unuan aparaton por uzi la sunan varmon ». Augustin, komplete skribita, pli bone honorus sian solenan antaŭdestinon, ĉar Augustin rilatas al la suna aŭgusta monato, kiu mem devenas el la latino Augustus, omaĝo al unu el la plej brilaj romiaj imperiestroj : Aŭgusto. Alveninta en 1864 al la imperia liceo de Tours (ĝi iĝos Descartes liceo en 1888), Mouchot naskita en Côte-d'Or (departemento 21) estas tiu homo, kiu, 2 jarojn poste, prezentos sian inventaĵon al alia imperiestro : Napoleono la tria. Lia « maŝino », suna generatoro, kiel klarigita de li, konsistis : « el metala spegulo kun linia fokuso, el nigrita kaldronego, kies akso koincidas kun tiu fokuso, el vitra kovraĵo lasanta alveni la sunradiojn ĝis la hejtkaldrono, sed malpermesanta ilian eliron, tuj post kiam tiu transformis ilin en obskurajn radiojn ».
Ili ankaŭ tradukis du mallongajn artikolojn eltiratajn el la revuo "ça m'intéresse" : sciurego kaj travidebleca muso.	paĝoj 2 kaj 3	La obskura flanko de la « Forto » La inĝeniero Charles Bontemps rememorigis en 1878 pri la defioj de tiu maŝino : « Ne sufiĉas al la aktivo de nia epoko disvastigi la penson per la telegrafo kaj la gazetaro, ligi la homojn per la vojaĝoj : nova problemo sin trudas, por kiu solvoj abundas ; ni volas paroli pri la difuziĝo de la forto ». Kaj tiu forto, « mistero, kiun la filozofio ne klarigis kaj kiun la fiziko studas, riviĝas al ni en tuŝebla formo : la laboro ». Venta, tajda, suna fortoj ! Kaj ja la sunon Mouchot volis « laborigi », ĉar por li gravis « iel bremsi tiun ruinigan forton kaj fari ĝin por la homa speco, anstataŭ plago, unu el la potencaj helpantoj ». La scienculo, evidente, sciis ĉion pri siaj antaŭuloj ekde Eŭklido (300 a.K.). Ni citu unuflanke, Arkimedon, kies « ardaĵ speguloj » verŝajne flamigis la romian ŝiparon sieĝantan Sirakuzon kaj aliflanke, Leonardon de Vinĉi, kiu imagis en 1515 la ideon de suna koncentrilo . Allogite sub tiun « sunon de Turlando », kie Leonardo de Vinĉi mortis, Mouchot, kun fandiĝema nomo, baldaŭ ekkrios : « Eureka ! », influita ankaŭ de René Kartezio, regiona infano, kiun li rigardas kiel « la plej brillan kaj puran el niaj naciaj gloriuloj ».
La novelon "Gissss..." tradukis Jean-Mary el short-edition.com/fr	paĝoj 3,4 kaj 5	Francio devancas la Usonanojn La usona inĝeniero John Ericsson konstruis maŝinon kompareblan kun tiu
Jan pierre rakontas pri sia piedirado al Santiago de kompostelo	paĝoj 5,6 kaj 7,8	
		Augustin Mouchot

de la Franco. Tio okazis en 1868. « Nu, argumentis Mouchot, se oni bonvolas memori, ke ekde 1866, mi jam havis 2 malgrandajn vapormaŝinojn funkciajn per la suno de Tours, oni des malpli kontestos mian meriton esti antaŭiĝinta al la famkonata usona inĝeniero, ke mi neniam kaŝis al iu miajn eksperimentojn ». Efektive, en Tours, la homo publike boligis akvon kaj li eĉ ellaboris bonegan bolitan bovaĵon per suna energio. La kuirado estis perfekta, kaj la Turanoj atentaj pri sciencoj kaj gastronomio aplaŭdis tiun « novan Prometeon ». Malpli apetitoveke, kupron, zinkon kaj eĉ sukcesis fameco atingis zeniton dum la 1878. Lia suna generatoro, 5 metrojn gazetaron : oni legis : « Nova erao malfermiĝas por la landoj bruligataj Algerio kaj Egiptio ekzemple, kie la disvolvi la agrikulturon same kiel la



Suna generatoro

aplaŭdis tiun « novan Mouchot fandis stanon, funkciigi pumpileton. Lia Universala Ekspozicio de diametro, ekzaltis la de riĉeco kaj de civilizacio de la suno, tiaj, kiaj estas suna generatoro povos industrion ».

Krepusko

Ne eĉ Maurice de Taste, kreinto de la franca meteorologio kaj kolego de Mouchot en la liceo de Tours, povintus antaŭvidi, ke « nigra nubo » fuŝos la energian revolucion, kiu ŝajnis profiliĝi. Pro la malkovro de karbaj minoj en la orienta Francio kaj la pliboniĝo de la fervoja reto faciliganta ĝian reprovizon, la eksplodmotoroj kaj la mondscale grandkvanta petroluzado mergis baldaŭ Mouchot en la plenan nigron de la Historio... Lia lasta rimarkinda ago estis, en 1882, la prezentado ĉe la Tuileries Ĝardeno (Parizo), de presmaŝino funkcia dank'al la suna energio, kiu eltiris 500 ekzemplerojn de gazeto titolita La Suno. Estis en Aŭgusto, do kiel Aŭgusto, sed ne kiel Augustin, kiu sole forpasis en la plej granda mizero, 87 jaraĝa, kun sia Honora Legio ie proksima de si. En La Recherche de l'Absolu (Serĉado de Absoluteco), Balzac, lia samtempulo, skribis : « La gloro estas la suno de la mortintoj, en via vivo, vi estos malfeliĉa, kiel ĉio, kio estis granda ».

Augustin Mouchot estis granda.

La lasta averto

En sia libro presita en Tours en 1869, Mouchot avertis : « Kiam oni pensas pri la enorma karbokonsumado, kiu estas farita jare en la mondo, ĉar en Francio , ekzemple, ĉiu grava fervoja linio bruligas pli ol 1000 tunojn da karbo tage, oni ne povas retenigi sin konkludi, ke prudentas kaj saĝas ne ekdormi tiurilate en trompa sekureco ».

La libro : La Chaleur et ses applications industrielles, 1869, imprimerie Mazereau.

. La varmeco kaj ĝiaj industriaj aplikoj, 1869, presejo Mazereau.

Artikolo eltirita el la Tours Magazine de Julio kaj Aŭgusto 2019 kaj esperantigita de Gérard kaj Jeannine Layseman.

BESTOJ

Rufoj kaj koloroj

Komparita kun niaj etaj okcidentaj sciuroj saĝe rufaj, tiu fotita en Aprilo de hinda interretano ŝajnis malmergiĝi el farbopoto. Iuj kredis al Aprilŝerco, aliaj al la malkovro de nova speco.


Nenio el tio : estanta en granda parto de Hindio, la giganta sciuro « Ratufa indica » havas felon nature tre koloran. Eĉ se neniu konas la kialon.



MEDICINO

Travidebla kiel muso.

Ĉe la universitato Ludwig- Maximilian de Munkeno, Germanio, la neŭroscienculo, Ali Ertük mergis mortintan muson en organikan solvilon por fandigi ĝian grasaĵon kaj ĝiajn pigmentojn. Tiu traktado reduktis la amplekson de la ronĝulo je 60% , faris ĝin travidebla kiel vitro kaj dura kiel plasto. Se la sceno ŝajnas eltirita el « nova versio de Frankenstein », ĝi aŭguras spektindan medicinan atingon : videbligi la ĉelajn konektojn de la organoj por plibonigi ilian kreadon tra 3D presado.



Tiuj 2 artikoloj estas eltiritaj el la revuo « Ca m'intéresse » de Junio 2019 kaj esperantigitaj de Gérard kaj Jeannine Layseman.

ĜISSSSS...

far Mome, el short-edition.com/fr, esperantigita de Jean-Mary

Ŝi kuras.

Ĉiutage, en ĉia vetero, ŝi kuras.

Kvazaŭ ŝi estus persekutata, kvazaŭ ŝia vivo dependus de tio.

Ŝi kuras por ne lasi sin atingi de la aĝo, de tiu ĉifro, kiu ekaperas en la horizonto.

Ŝi kuras kontraŭ la jaroj, kiuj markas ŝin per fero, ŝi trejniĝas kun arda pasio.

La ĉielo estas lazura, la printempo bruas per ĉiuj ĝiaj voĉoj, ĝi estas plena je donacoj, ŝi nenion rigardas, ŝi kuras. Ŝi estas aŭskultanta sian korpon, ŝi kontrolas sian korritmon per sia altteknologia brakhorloĝo.

Sur la vojo moviĝas silueto kun malrapideco, preskaŭ kun hezitemo. Ŝi ekvidas ĝin, jam ĉagreniĝas pro tio, kio povus malrapidigi ŝian kuradon. Estas sola persono. Des pli bone, almenaŭ ne estas hundo. Hundoj estas timindaj, aŭ ili eksekvas ŝin, aŭ ili saltas ĉirkaŭ ŝi kaj rompas ŝian ritmon... Ŝi malsuprenkuras sur la kava vojeto, kun regulaj kurpaŝoj. Elspiri, enspiri. Ŝajnas, ke ŝi konas tiun silueton antaŭ si. Ŝi mallevas la okulojn kaj koncentriĝas sur la pinto de siaj ŝuoj. Bone reguligi siajn kurpaŝojn. Ŝi kuras ; baldaŭ ŝi atingas la obstaklon. Oj ! Ŝi rekonas ŝin. Ŝi estas Lunjo, amikino. Ŝi devos halti. Kiel alie fari ?


Ŝi intencas tion apenaŭ unu sekundon. Ĉar halti signifas havi malpli bonan rezulton. Aparte tie, ĝuste piede de la suprenirejo... Aliloke, eble, sed tie, la impeto estos rompita, ŝi ne retrovos sian kurritmon. Ĉiuj penoj, kiujn ŝi faris de kiam ŝi eliris el sia domo, ĉiuj englutitaj kilometroj estos perditaj. Tiam ŝi levas la manon, rigardante rekte antaŭen. Kiam ŝi eldiras sian ĝojan abruptan alparolon : « ĝissssss...

Lunjo ! », ŝi jam preterpasis sian amikinin. Ŝi plu ŝvingas la manon, ŝi kuras. Ŝi metas la mentonon sur la bruston por pli bone regi sian spiradon.

Malgrandega kaj malagrabla penso kraketas ĉe la malantaŭaĵo de ŝia kranio. Ŝi skuas la kapon kiel besto agacata de insekto. Ŝi ne volas lasi sin invadi de la plej malgranda memriproĉo. Ĉiel estas nun tro malfrue post kiam ŝi preterpasis. Tamen, kion ŝi aŭdis freŝdate pri Lunjo ?... Sanproblemoj... gravaj... pankreato...

Ŝi malbonŝancas, kompreneble, sed Lunjo estas batalemulino, kaj estas tiom da onidiroj, voĉbruoj estas danĝeraj. Tamen ŝi povintus halti... Ŝi devintus halti... Ŝi forpelas la ideon. Tro ĝenan. Tio damaĝas ŝian plezuron kuri, ŝian kontentigon superi sin mem... Ŝi abomenas senti sin devigata. La maratono proksimiĝas, interrompita trejnado estigas senvaloran rezulton. La ĝeno persistas. Ŝi liberigas sin de ĝi : ŝi iros viziti Lunjon ekde morgaŭ. Aŭ proksiman tagon. Sed ŝi vizitos ŝin, tio estas certa.

La plejgravaĵo estas ke ŝi parolis al ŝi : « Ĝisssss... Lunjo » ! Ŝi donacis al ŝi kvazaŭ etan promeson, kodon kiu diras : « ĝis baldaŭ... » Kaj kion Lunjo respondis kiam ŝi preterkuris ŝin ?



— Atendu ne tro longe... Sed ne . Ne. Ŝi pli verŝajne diris al ŝi : «Kuru ne tro longe. » Nu, oni vidos. Ŝi vizitos ŝin.

Malantaŭ ŝi, Lunjo, apogata sur siaj bastonoj, sekvas ŝin per la okuloj. Silvia, amikino, ĵus preterpasis... Amikino ?

Senmova ĉe la ocela ombro de maljuna floranta ĉerizarbo, Lunjo absorbas la printempan kamparon, enspiretas kun deteniĝemo kaj tamen malsato. Ŝi rigardas ĉirkaŭ si, scias ke nenieco jam kaptis ŝin, neeviteble englutas ŝin. Tiu promenado estas kvazaŭ adiaŭo. Ŝi scias ke restas al ŝi malmulte da tempo. Ŝi ne plu kuros. Ŝi plukas per la okuloj la verdajn kaj flavajn primolojn sur la taluso, memoraĵo pri la infanaĝaj bukedoj ; sur la herbejo kie paŝtiĝas du belaj ĉevaloj, kelkaj pigoj petolas inter la lekantetoj. Ŝi lastfoje salutas la mondon ; kiel bela tio estas kaj kiel sola ŝi estas. La printempo estas sufoka pro mildeco, la aero faras teneran kareson, kiu ŝin ĉirkaŭvolvas kaj izolas ; ŝin lulas kaj jam forportas. Lunjo sentas sin sola. Tiom sola...

La tridek kilometroj estas englutitaj, la tempomezurado blokita. Nula rezulto. Dek kvin sekundoj perditaj ! Certe perdis Silvia tiun tempon en sia hezitiga reago dum la renkonto kun Lunjo kaj poste en siaj senutilaj remaĉoj.

Ŝi rekomencas siajn trejnadon kun rigoro kaj metodo. La maratono de la 15a de aprilo estas ŝia fina celo. Ŝi ne estas spirmanka, ŝi ĝuas bonan sanon, ŝi montros tion. Ŝi ne plu havas junecon. Ŝi kuratingos ĝin.

La postajn tagojn pluvas kaj ŝi kuras, brumas kaj ŝi kuras. Ŝi pensas pri Lunjo, kompreneble. Ŝi pensas pri ŝi, ŝi vizitos ŝin. Ŝi diris tion : »Ĝisssss..., Lunjo ». Baldaŭ... Promesite. Morgaŭ.

La morgaŭon freŝa kaj suka suno ruliĝas en la ĉielo kiel bela frukto. Ideala por viziti sian amikinson. Ili kune marŝos.

Sed, post kiam esti tiom kurinta sub pluvo kaj en malvarmo, seniĝi je tiu tiel klara tago, kiam la konkuro estas tiel proksima, tio ne ŝajnas racia. Tio eĉ estus vere neproduktiva. Kiam oni faras ion, oni plene faru ĝin, aŭ oni ne faru ĝin... Ŝi zorgige ekipas sin, konektas sin, metas sian harbandon sur la fronton. Ŝi ekfunkciigas la tempomezuradon kaj impetas.

— Ĝisssss..., Lunjo.

La maratono proksimiĝas, ne estas la tempo por malfortiĝi ; ne tiel proksime de la celo.

La maratono ŝi ne finos ; malbona impeto estigas muskolan disstreĉadon. Ŝi lamas ĝis la unua sukurejo. Finite.

Ŝi hejmeniras, ŝi jam refortiĝis : tuj kiam ŝia maleolo resaniĝos, ŝi reekuros !

Dume ŝi povos fine viziti Lunjon. Ekde morgaŭ. Tio vere bone estos al ili ambaŭ.

La renkontiĝo okazas la postan tagon. Sed Silvia ne estas sola. Ĉiuj amikoj estas tie kaj ankaŭ la tuta familio de Lunjo...

La renkontiĝo okazas en la malgranda preĝejo de la vilaĝo. Malantaŭ la portata korpo de ŝia amikino...

— Ĝis plu neniam, Lunjo.

Piedirado al Santiago de Kompostelo (unua parto)

Mia dorsosako estas preta de pluraj tagoj. Mi gvasis favoran cirkonstancon, la plej bonan meteofenestron kiel diras la alpistoj, por preni mian sakon kaj foriri atingi tiun marbordan vojeton. Trompo estas diri ke tiu vojo al Santiago estas marborda vojeto, tiom maloftaj sur la tuta vojiro estas la haltlokoj apud la marbordo. Sed mi devas efektiviĝi ĉi tiun aventuron komenciĝintan kvar jarojn antaŭe en Arles kun mia amiko Patrick. Tiun jaron ni estis planintaj foriri en majo por trairi tiun lastan vojon. Sed mi devis lasi lin iri sola, retenite en granda blanka institucio, kie homoj bonfaraj kaj blanke vestitaj prizorgas vin. Mi ŝatas foriri sola. Mi bezonis, por testi mian mekanikon ĵus restaŭritan, piediri laŭ mia ritmo kaj elekti laŭbezone mallongajn etapojn por ne malutili al la marŝadantaro. Kiam oni marŝas plurope, instinkte nia paŝado ne estas sama. Kelkfoje oni volas plilongigi la paŝon por sekvi, aŭ male oni sentas la bezonon esti antaŭe. Tiam la bonfaro de la marŝado ne plu estas la sama, ĉar la korpo kaj la spirito ne estas en la optimumaj kondiĉoj, kiujn nur la malrapideco kaj soleco havigas.



Ribadesalla

Tagon T

Post longa vojaĝo en aŭtobuso mi retrovas Ribadesallan, turisman urbeton, kiu etendiĝas marborde, kie mi haltis la lastan jaron. Mi dormas surfolernejo, kiu en ĉiu tempo de la jaro akceptas biciklantojn kaj migrantojn. La Institucio estis tute renovigita, la dormejoj (tri niveloj por litaĵaro) kaj kromkonstruaĵoj estas en bonega stato. La lernejo rigardas al la marbordo. Kvankam septembras, ankoraŭ estas kelkaj ĝeĵunuloj, kun haroj en la vento, blankegaj dentoj, brunigita vizaĝkoloro, kiuj vagas en maldiligenta maniero. Kontraŭe al la biciklantoj, kiuj vivas en sia mondo kaj malestimas la migranton, estas agrable havi kompanion kun la surfantoj, tiuj marekvilibristoj. Mi alvenas malfrue kaj ĉiuj malsupraj litaĵaroj de la dormejo estas rezervitaj. Kiam mi estas (tamen suple) grimonta al la supra nivelo, junulo insistas por lasi al mi sian lokon. Kompreneble mi rifuzas, sed pro lia insistado mi fine akceptas, des pli ĉar li jam entreprenas lokiĝi tien supren. Tamen mi restas dubema. Tio estas ja la unua jaro, ke oni donas al mi tian atenton. Ĉu pro miaj lipharoj, kiuj pli kaj pli ornamas sin per blankaj haroj ? Ĉu mi maljuniĝas ?

T+1

Ribadesella > Sebrayu

31,97 km. Niveldiferenco - 752,47 + 738,61 / km vojeto 8,59 vojo 23,38

La vetero belas. Miaj ŝuoj formikas. Apenaŭ tagiĝas kaj mi foriras. Tiel kontenta retrovi la liberecon, kiun havigas la vagado, mi marŝas multe tro rapide. Kaj dum la unuaj tagoj, ĉio, kio pasas tra la cerbo, estas nekredebla. Tiam, en la frenezeco de momento, mi devojiĝas kaj forgesas vojmontrilon. Mi retrovos la vojon post longa ĉirkaŭvojo. Tiun tagon mi marŝos multe pli da kilometroj ol antaŭvidite por tiu tamen jam longa etapo por unua tago. Lacega mi atingas meze de junuloj agrablan municipan gastejon. Ni estas du knaboj inter ses knabinoj, ĉiuj havas malsaman naciecon (Germanujo, Italujo, Anglujo, Hispanujo kaj Vendeo). Tial la interparolo ne estas facila, sed ridetoj kaj gestoj ebligas al tiu grupeto kompreni la plejgravaĵon de tio, kion oni volas esprimi. Ĉar la franca ne estas komprenata, mi kaptas la okazon por paroli esperante. Aŭdante nekonatan sonoron, la rigardoj de la grupeto montras miron kaj la travivata situacio demonstras la intereson de tiu neŭtrala lingvo.

La veturilo de la nutraĵvendisto, kiu estis proviantonta nin, paneas. La respondeculino mem ricevas niajn mendojn, por ke ĉiu el ni povu refortiĝi per sobra manĝo.



T+2

Sebrayu > Deva

28,41 km. Niveldiferenco - 901,65 + 960,65 / km vojeto 9,99 vojo 18,42

Unue ellitiĝinte, mi izolas min sur la etaĝo por finpretigi mian sakon. Tio estis anoncita de mia vojmontranto Patrick, kiu sendas al mi la meteobultenojn de la venontaj etapoj. La ĉielo estas ĉagrenita kaj venĝas faligante pluvon fajnan sed tenacan. Mi surmetis gamaŝojn, pantalonon kaj pluvjakon kaj forlasas post bona dormo la ankoraŭ dormantan kuŝlokon. Ĉe la vilaĝa elirejo preterpasas min du hispanoj, kiujn mi ne revidos dum la tago, tiom rapida estas ilia paŝado. Observante kelkajn tipajn markojn kiel GRP (granda landomigrado). Mi pensas, ke ili faras buklon vojiron. Ankaŭ dum tiu etapo iuj marŝantoj viditaj hieraŭ elektas la Camino Primitivo (primitivan vojon) : tiu vojo iras al Santiago sed ne laŭiras la marbordon. La hodiaŭa kuŝloko estas kampadejo, en kiu troviĝas la gastejo de peregrinos (pilgrimantoj), certe la plej trista loko. Malnova kaj neadaptita. En la ĉambro por sakoj kaj ŝuoj, du etiketitaj sakoj estas tie. Kia surprizo vidi la du virojn de la hodiaŭa mateno alveni. Ili povis rapidigi siajn paŝojn. Tio estas la vojo al Santiago de kompostelo. Ĉiu praktikas ĝin laŭplaĉe. Turisto, marŝanto, kuranto, junulo, maljunulo, altulo, malaltulo, dikulo, maldikulo, sportisto, rajdanto, tordkrurulo, handikapulo, pilgrimanto, marŝadanto devas dividi la vojon. Koncerne la biciklantoj, ili perforte pasas.

T+3

Deva > Avilès

33,05 km. Niveldiferenco - 499,14 + 449,60 / km vojeto 2,92 vojo 30,13

Hieraŭ pluvis tuttage. Silenta, tenaca pluvo, fajna sed penetranta. Samas hodiaŭ. Sed la ĉielo estas tiel nigra, ke ĝi lasas malmultan esperon por favora evoluo. La pluvo ofte estas agresiva kaj necesas pli protekti sin. Dikaj gutoj dispremiĝas, farante beletajn bobelojn sur la pavimoj de la trapasitaj vilaĝoj. Ifoje la pluvo ŝanĝas sian ritmon kaj fariĝas pli milda, eĉ nevidebla, tiel delikata, ke oni forgesas ĝin, sed tamen ĝi ja ĉeestas. Tiutage senĉese pluvas kaj mi estas malseka ĝisoste. Feliĉe tiu granda gastejo kun sesdek litoj estas bone ekipita. Germana virineto, perdiĝinta en la urbo hodiaŭ matene, kiun mi estis iom

akompaninta, proponas al mi dividi la kostojn per uzo de lavmaŝino kaj tuksekigilo. Ŝi redonas al mi mian tolaĵon faldita kaj ankoraŭ varmega. Tiu vojparto estas unu el la plej malagrablaj sur la vojo. Longa vagado en la urbo Ĝijon, kie mi malfacile trovas la ĝustan vojon pro manko de vojmontriloj. Poste necesas kontentigi sin per industriaj zonoj, laŭirante multajn uzinojn pli malpli poluajn. Fine necesas marŝi sur la vojflanko de la ŝtata vojo, kie kamionaroj veturantaj je alta rapideco abunde duŝas min. Tiuvespere mi demandas min pri la daŭrigo de mia migrado, se la pluva vetero persistos. Mi vespermanĝos en la urbo. La ĉielo ŝajnas seniĝi je siaj malbelaj nuboj.

T + 4

Avilès > Muros de Nalon

21,95 km. Niveldiferenco – 485,41 + 589,20 / km vojeto 7,44 vojo 14,51

La ŝtonplena vojeto, la traŭro de la eŭkalipta arbaro estas rapide forgesitaj, ĉar tiom da asfalto estas tie. Fakte, tiu vojeto tiel nomata marborda kontinue kaŝludas kun la ŝtata vojo 632 poste 634 kaj la aŭtovojo. Oni marŝgrimpas sur la vojflanko de unu por atingi per ponto aŭ tuneleto la rapidan vojon, de kiu oni foriĝas kaj kiun oni retrovas post kelkaj tagoj. La padoj, la arbaraleoj, la vilaĝetoj traŭritaj estas tie nur por distri nin. Por meriti sian nomon, la vojeto kondukas nin tro malofte al la marbordo, kiun oni retrovas kun plezuro. Ankaŭ tie la grandaj ventmuelejoj spitas nin kaj akaparas nian rigardon. Kia trompado estas tiuj ventmotoroj, kiuj poluas nian naturon.



Avilès : urbodomo

Tago sensuna sed la aero estas milda. Mi haltos en privata gastejo, la Casa Carmina. Bela loko. Mi piediras sola kaj la vesperon mi retrovas konatajn vizaĝojn kiel Victor de Sévilo, kiu piediras kun sia edzino. Filozofia profesoro, Victor estas klera homo kaj la vespero kun tiu paro pasis rapidege.

T + 5

Muros de Nalon > Santa Marina

15,47 km. Niveldiferenco – 617,79 + 509,74 / km vojeto 6,12 vojo 9,35

La bona vetero ŝajnas instaliĝi. La suno ja montras la finon de sia nazo malfrue en la mateno sed la fundo de la aero estas varma. Paŝi estas agrable en tiaj kondiĉoj. La aŭtuno estas tie kun sia kolora peckudraĵo. Post la unuaj du tagoj de monologo, post kiam mi parolis sola paŝante, hodiaŭ mi fajfas. Mi provas respondi al la birdoj aŭ mi fajfetas miajn plej ŝatatajn melodiojn.

Tiun vesperon (Victor telefonis) mi rezervis en pensiono. La restoracio kaj la konstruaĵo, kiu ŝirmas ladormoĉambrojn, situas ambaŭflanke de la fama nacia vojo 632. La tenantoj estas ĉarmaj. La pensiono Prada, granda burĝodomo, bonege restaŭrita, estas belaspekta. Ĝi atestas arkitekturon de epoko kun prospera pasinteco. Kvankam la restoracio ne samaspektas, menuo kaj matenmanĝo servataj al la pilgrimanto estas abundaj kaj senegalaj pri kvalito kaj prezo. Mi havas bonan memoron pri tiu etapo, dum kiu mi retrovas skipeton : Fleur kaj ŝia nederlanda patrino, Juan, juna hispano, kiu faras amajn okuletojn al Fleur, Thiuan, bela Tajvanino kaj Mikaleo sporta germano ĉiam kontenta trovi min.

Sed mi ne revidos Victor. Lia edzino malrapide marŝas kaj bezonas ofte halti. Ili do estas devigitaj fari nur mallongajn etapojn.

T + 6

Santa Marina > Luarca

26,74 km. Niveldiferenco - 905,15 + 778,43 / km vojeto 9,34 vojo 17,40

La neevitebla N 632 estas denove trafikplena kun krome alproksimiĝo al la aŭtovojo kaj ties

aŭtovoja viadukto. Viaduktoj estas ĉie en la pejzaĝo, ankaŭ horreos (malnova grenejo). Sed tiu etapo estas agrabla malgraŭ kelkaj krutvojoj, kiuj streĉas la subgenuon. Luarca estas la halturbo. El la alta urbo oni ekvidas la plezurhavenon. Mallarĝaj deklivaj vojoj, malsuprenkuritaj ŝtuparoj igas min rapide atingi la urbocentron, kie inter la lastaj mi prenos liton en eksa lernejo transformita en komunuman gastejon. Post la kutima LSD (Lesivado, Siesto, Duŝo) mi retrovas la grupeton en urbe kaj Michel, kiu, kun la dikfingro supren, ĉiam estas kontenta trovi min.

T+7

Luarca > La Caridad

30,65 km. Niveldiferenco - 592,56 + 644,48 / km vojeto 5,73 vojo 24,92

Kiom da bitumo ! Multaj mallarĝaj vojoj, kie la vojlanda herbo senĝene invadas la vojmezon. Beletaj mallarĝaj vojoj, ligilo inter la domaretoj, ebligantaj malkovri la riĉan santiagan pasintaĵon : kapeloj, pli luksaj konstruaĵoj, malnovaj ŝtonoj pli malpli bone vicigitaj. Survoje mi rekontas Henri kaj Georges, du francoj, kiuj kune marŝas per sekura kaj regula paŝo. Ĝis Santiago oni regule rekontiĝos. De kvar tagoj la vetero estas agrabla. Kvankam la suno konsentas radii nur fine de la antaŭtagmezo sed sen agresemo, ĝi varmigas nin posttagmeze kaj donas al ni mildan lumon vespere. Mi demetas la sakon en la simplegan kaj puregan gastejon de la komunumo.



Luarca

T+8

La Caridad > Ribadeo

22, 21 km. Niveldiferenco – 99, 79 + 84, 25 / km vojeto 1, 94 vojo 20, 27

Hodiaŭ mi forlasas la provincon Asturio kaj eniras Galegion. Por montri tiun landoŝanĝon akompanas min persista pluveto la tutan antaŭtagmezon. Poste peco de blua ĉielo aperas, la lastaj nuboj malaperas kaj regas la suno. Mi iris sur parto de la vojo kun Henri kaj Georges sed sufiĉe baldaŭ eskapis por lasi ilin kun ili mem kaj min kun mi. Oni eniras Ribadeon per 600 m longa piedira irvojo ekde la ponto, kiu transpaŝas riveron. Neniu problemo por tranokti ĉar gastejoj estas tre multnombraj ; kaj mi retrovas la grupeton.


T+9

Ribadeo > Lourenza

27,53 km. Niveldiferenco - 657,59 + 643,70 / km vojeto 8,29 vojo 19,24

La tutan antaŭtagmezon la ĉielo estas plennuba kaj malfacilas al la suno sendi siajn radiojn tra la nuba maso.

Survoje mi trinkos kafon kun Michel.. Oni ne interparolas. Oni diras kelkajn vortojn de tempo al tempo por akompani geston, mimikon. La alfabeto ankaŭ estas rideto, miro. Unu frapas la ŝultron de la alia. Oni interkompreniĝis. Ni ne kune piediros ĉar niaj paŝoj estas tro antinomiaj. Miaj marŝadŝuoj skrapas la grundon dum li ŝajnas superflugi ĝin sed mi retrovos lin kaj ties grupeton ankoraŭ en la sama privata gastejo. La gastejo Castelos estas freŝdate malfermita kaj apartenas al ĉeno. La servoj estas preskaŭ luksaj kaj ĉiel funkcias en ekzempla maniero. Hodiaŭ vespere la grupeto preparas amason da pastaĵoj kun salmo. Mi izolos min kun mia tomato kaj mia sardinskato en apuda salono por lasi ilin kune en la kuirejo. Kaj ankaŭ ĉar foriri sola estas doni tempon al si, por si, certe ja en relativa soleco, pro la apudeco de la aliaj. Fleur surprizos min alportante al mi teloron da pastaĵoj. Mi delektiĝas.



Ribadeo

Daŭrigo kaj fino en la venonta turlanda luko ...